Hans Christian Andersen,

Infanrimaĵo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Pupo mia, dancu vi!
Kiel bela estas ĝi,
la fraŭlin'! Kaj ankaŭ la
kavalir' aspektas ja
en la blua frako tre
elegante, aŭ ĉu ne?
Estas belaj li kaj ŝi.
Pupo mia, dancu vi!

Jen la pup' de l' lasta jar',
kun la flava kapharar'!
Estas ĝi la Lizinet',
la malnova lud-pupet'.
Venu, olda amikin',
mi nun volas lavi vin.
Vi nun dancu ĉiuj tri!
Rigardindas tio ĉi!

Dancu, mia pupo kun
la aliaj pupoj nun!
Paŝo flanken, unu klin'!
Ĉiam tenu rekte vin!
Vi turniĝu kiel rad',
tre sanigas la dancad'!
Plaĉas tio ĉi, ĉar vi
estas ĉarmaj ĉiuj tri.

...

Hans Christian Andersen,

Et børnerim

Danse, danse, dukke min!
Nej, hvor frøkenen er fin!
Kavaleren ligeså,
han har hat og handsker på,
bukser hvide, kjole blå,
ligtorn på de store tå.
Han er fin, og hun er fin.
Danse, danse, dukke min!

Her er gamle Lisemor!
Hun er dukke fra i fjor;
håret nyt, de er af hør,
panden vasket er med smør;
hun er ganske ung igen.
kom nu med, min gamle ven!
I skal danse alle tre.
Det er penge værd at se.

Danse, danse, dukke min!
Gør de rette dansetrin!
foden udad, hold dig rank,
så er du så sød og slank!
Neje, dreje, snurre rundt,
Det er overmåde sundt!
Det er nydeligt at se,
I er søde alle tre.

...

Traduko de la Dana poemo "Et børnerim" de Hans Christian Andersen *(Johano Kristiano Andersen', ∗1805-04-02 – †1875-08-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1991-08.*

MR-248-1 / Arg-246-497 (2005-04-22 19:40:53)

Verkinto de tiu ĉi Dana poemo estas Hans Christian Andersen *(Johano Kristiano Andersen', ∗1805-04-02 – †1875-08-04).*

Arg-246-496 (2004-06-10 11:35:04)